

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 penceoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Unu numero: 4 penceoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 65 (Sixth Year)

Melburno (Melbourne), Australio.

10 novembro 1925

HERE AND THERE.

Japanese medical men are giving a lead to the world in their use of Esperanto. Dr. Tomosaburo Ogata, professor of pathology, at the Tokio Imperial University, who had published in Esperanto a treatise on Sarcoma, has now published, in Esperanto only, a treatise on the effect of feeding birds with a diet lacking vitamine B and also a comparison of the resultant effects with the Beriberi disease. These reports are in the 32nd vol. of reports of the Medical Faculty of the Tokio University, one of the most authoritative publications in Japan and one which is attentively perused by the medical profession.

A class under the guidance of S-ro K. Ossaka, mechanical engineer to the Railway Department, has been commenced at Tokio. S-ro Ossaka had an article in "Young Railwaymen," which elicited many inquiries regarding Esperanto.

That the Japanese fully understand Esperanto is attested by the fact that a lecture on such an abstruse subject as "Mendelism," as given by S-ro M. Oka, is said to have greatly impressed the hearers.

According to the programme of the Association of Office workers in Rio de Janeiro, Esperanto will be a compulsory subject in their commercial course. The association has a membership of more than 24,000.

At last year's meeting of the International Conference of Academies a United States delegate proposed the adoption of an auxiliary language, but after discussion it was decided to postpone further consideration until the next meeting. The Imperial Academy of Japan was asked to express its opinion. It decided that it would not make an official decision but would take a vote of the members and report the result through Dr. T. Fukuda, who will attend this year's conference. At the general meeting in March attended by 43 members, the questions were put, (a) "Is it desirable to have an auxiliary language." Those present (43) voted "Yes." (b) "What language should be adopted?" Voted—for Esperanto, 24; for Ido, 1; refrained from voting, 18. Dr. Asaziro Oka, the famous zoologist, and well known Esperantist was at this meeting elected to the Academy. Other Esperanto members are, Dr. Nakamura and Dr. Baron Hozumi.

The St. Omer, (France), group held an Esperanto Exhibition from 24 September to 8 October. The municipality made a donation of 200 francs

At the "Floreasa" Hippodrome, Bucharest, a prize of the value of fifteen thousand Roumanian lei, is referred to as "Esperanto"

EL LETEROJ DE VOJAĜANTA AŬSTRALIANO.

Kara amiko,

Jen mi estas inter la famaj ruinaĵoj de Zimbabwe, kiujn mi trovis treege interesaj.

Tie ĉi mi renkontis Sir Gregory Foster kaj lian edzinon. Kune ni faris kelkajn ekskursojn tra la ruinaĵoj, kaj mi jam forte interesigis lin pri Esperanto, kaj, per helpo de "International Radio Manual," iom instruis lin. Sir Gregory Foster estas Preposto de la Londona Universitato kaj antaŭ nelonge li ricevis peton de la Sidneja Universitato, iri tien por fari paroladojn, sed bedaŭrinde, li ne povis akcepti la inviton. Antaŭ multaj jaroj li renkontis s-ron H. Bolingbroke Mudie, [unu el la pioniraj anglaj Esperantistoj—Red] sed ne estis konvinkita, ke Esperanto estas utila. Post kiam mi rakontis miajn spertojn en multaj landoj, li diris, ke li certe lernos ĝin.

Ce Johannesburg mi renkontis la vic-delegiton de la U.E.A., s-ron Mawbey, kiu tre afable akceptis min. Ni antaŭe renkontis unu la alian ĉe Praha kaj ankaŭ en Londono, kaj ni babiladis pri tiuj feliĉaj tagoj.

Mi esperas ekvojaĝi per la "Chicago Maru," la 29an de julio, ĝis Rio de Janeiro. Intertempe mi vizitos la akvofalegojn ĉe Victoria. Amike salutante la klubanojn, fidele via, Percy T. B. Hudson, 11 julio '25.

LIBROJ RICEVITAJ.

La Evangelio laŭ Sankta Johano. Tradukita el la originala Greka teksto de Profesoro Wren J. Gristead, Doktoro D. O. S. Lowell kaj Pastro R. P. Anderson; eldonita de Scripture Gift Mission, 14 Bedford Street, Strand, London. Havebla senpage de la Esperanta Kolportista Asocio, 64 St. Thomas' Road, Finsbury Park, London, Anglujo.

PRI LA PREPOZICIO "DA."

Se oni havas malfacilon pri la uzado de "da," oni devas studi ĉapitron 32 de Ekzercaro kaj ĉiun frazon en Ekzercaro, en kiu troviĝas la vorto. Plue la lernanto legu numeron 16 de Lingvaj Respondoj, en kiu Do. Zamenhof diras:—Dum la vorto "da" (kiu enhavas kaŝite la sencon de "ia") montras, ke ni parolas pri kvanto de ia aĵo, sed ne pri ĝia individueco (ekzemple peco da viando—peco da ia viando), la artikolo "la" montras, ke ni parolas pri objekto individue difinita (aŭ pri ĉiuj objektoj de la sama speco), de kiu ni prenas parton (ekzemple "peco de la viando, kiun mi havas antaŭ mi").

La temo estas ankaŭ tre plene kaj klare pritraktita de Sro. Eggleston en Oficiala Gazeto. Volumo 3a, paĝo 263 (Februaro, 1911).

Studinte la Ekzercaron kaj la supre montratajn artikolojn de Do. Z. kaj Sro. Eggleston, mi faris al mi la jenan regulon, kiun mi trovas bona gvidanto:—

(1) "Da" post ia vorto montras, ke tiu ĉi vorto havas signifon de mezuro.

(2) Oni devas uzi "da" post substantivoj, kiuj povas esti aŭ objekto aŭ mezuro, kiam estas necese montri, ke oni parolas pri mezuro, ne pri la objekto mem, ekzemple "Glaso de vino" estas glaso, en kiu antaŭe sin trovis vino, aŭ kiun oni uzas por vino, (wineglass); "glaso da vino" estas glaso plena je vino" (glass of wine). Krom tio neniam uzu "da" antaŭ "la," persona nomo, persona pronomo, demonstrativa pronomo (tiu, tiu ĉi, tio, tio ĉi), aŭ antaŭ aŭ post fundamenta (cardinal) nombro.

—George Gordon.

HAROLD PUDNEY

Specialisto pri Fontanplumoj.

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Li speciale prizorgas mendojn per poŝto. Memoru la adreson

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

GRANDANIMA OFERO!

Sub ĉi-tiu rubriko, "La Suda Krucio," en la septembro numero komentariis proponon de s-ro de Saussure, kiun li nomis "Nov-Esperanto," kaj pri kiu ni antaŭdiris ke ĝi baldaŭ estos sekvata de alia. Eĉ pli frue ol ni atendis, la nova alvenis! En flugfolio, sendita al konataj Esperantistoj, estas la jena deklaro, — "Lingvo vivas sendepende de sia ortografio: efektive, lingvoj ekzistis jam de longe antaŭ la elpenso de la skribarto. Esperanto, kiel vivanta parolata lingvo, ankaŭ ekzistas sendepende de sia ortografio. Rimarkinte do, ke la ĉefaj kritikoj faritaj kontraŭ Esperanto koncernas, ne la lingvon mem, sed nur ties ortografion, mi volas provi enkonduki en la teknan literaturon novan skribmanieron pli praktikan kaj pli konforman al tiu uzata en la modernaj kulturlingvoj." La ĉefa trajto de la "reformo" estas la forigo de la supersignitaj literoj, sed tio estas atingita nur per la forlaso de la pure fonetikan principon de Esperanto. "La fonetika principo, kiun mi proponas, estas iom pli elasta: unu sonon aŭ dusekon Mi do klopodos por eldoni "Teknikan Revuon" en Esperanto Zamenhofa, skribita per la nova ortografio La Revuo aperos kiel eble plej ofte laŭ niaj monrimedoj." Kial s-ro de Saussure ne volas eksperimenti kun lingvo de sia propra elpensado kaj permesi la Esperantistojn uzi Esperanton en tiu formo en kiu ĝia genia aŭtoro donis ĝin al la mondo?

En broŝuro, je dato 1 septembro, sub titolo "Post la Kongreso de Esperanto en Genevo" s-ro "Antido, disĉiplo de Zamenhof," diras "Ido estas ne taŭga por la parolado, ĉar ĝia strukturo estas pli komplika, ol tiu de Esperanto. Ido havas internan difekton pli gravan, ol la eksternan difekton de Esperanto. Restas nur unu rimedo: konservi la strukturon de reform-projekto Nov-Esperanto. Mi do hodiaŭ forlasas la Esperantan standardon kun verda stelo sur blanka fundo kaj levas la standardon kun blanka stelo sur verda fundo. Tio ne signifas, ke mi publike atakos Esperanton. Ne: mi simple propagandos por Nov-Esperanto kaj atakos nur la

tro konserveman Esperantiston." Kiu vivos, tiu vidos!

ESPERANTO EN LERNEJOJ.

Depost pasko en Chemnitz (Sak-sujo) Esperanto estas sukcese enkondukita kiel elektelebla lingvo en kvar duagrada lernejoj (gimnazioj, real-lernejoj ktp.), post kiam oni jam instruis ĝin pli longtempe en la lernejoj unuagrada. Estas necesege por nia movado, ke ankaŭ la lernantoj de la duagrada lernejoj lernu Esperanton, kvankam ili devas lerni ankoraŭ aliajn fremdajn lingvojn. Oni baldaŭ ekkonos, ke Esperanto estas tre bona ilo por plifortigi la lingvan senton kaj por faciligi la studadon de aliaj lingvoj. Per tio ni nur povas akiri novajn amikojn kaj venki multajn malvolojn!

La kursoj daŭriĝos du jarojn je unu horo ĉiusemajne krom la ferioj. La dua jaro estas destinita por la perfektigo. Ĝis nun partoprenas nur kelkaj klasoj en ĉiu lernejo, ekzemple en la reformrealgimnazio nur la kvaraj klasoj aŭ en la reformrealgimnazio nur la kvaraj klasoj aŭ en la superrealernejo nur la triaj klasoj aŭ en la realernejo nur la kvaraj kaj kvinaj klasoj. Tiu maniero estas tre agrabla por la docento, ĉar la lernantoj havas la saman scion. Malgraŭ tiu limigo partoprenas sufiĉe da lernantoj, kaj ili ĝoje kaj volonte lernas, kiel la skribinto de ĉi tiu artikolo povas konstati, ĉar li mem instruas esperante en tiuj tri lernejoj. En la kvara instruas instruisto de tiu ĉi lernejo.

Krom tio baldaŭ kurso komenciĝos por kelkaj instruistoj de tiuj lernejoj. Tio pruvus, ke oni interesiĝas pri Esperanto ankaŭ en la duagrada lernejoj kaj ke ni nur devas ekveki ĝin! —D-ro v. Malachowski, en "Heroldo."

INTERNACIA FOIRO ĈE LYON.

Ĉu tiu Foiro havos lokon de 11 ĝis 15 marto, 1926. La komitato eldonis ilustritan gvidilon en kiu troviĝas kelkaj konsiloj al la aĉetistoj, informoj por partoprenantoj, kelkaj opinioj, kaj respondo al la demando, "Kio estas la Foiro de Lyon." "Gvidlibron de la aĉetanto" kaj aliajn deziratajn informojn oni povas senpage ricevi el la Administranta Delegito, Hotel de Ville, Lyon.

KRONIKO.

MELBURN, V. — La ĉefaj kaj plej interesaj programeroj dum Oktobro, estis la debato — "Egalvalora Pago por Egala Laboro," — kaj la ŝaradoj. La anoj ĉiam montras entuziasmon pri la debatoj, kaj ĉi tiu ne estis escepto. La temo donis okazon por la esprimado de diversaj opinioj, unuj ŝercaj, aliaj seriozaj, kaj fine, jesa decido rezultis.

La unua prezentado de ŝaradoj, dum la nuna jaro, estis bone akceptata, kaj ili estis amuzaj kaj instruaj. Tia senprepara interparolo estas bona por la partoprenantoj kaj helpas ilin akiri memfidon, kaj pli fluan stilon.

Alia ero el la programo, estis Literatura Nokto, kaj interesaj trodokaĵoj estis legitaj de la anoj.

Granda sukceso sekvis la eksperimenton kiun la asocio faris la 23an de Oktobro. La nomoj de oftaj objektoj, ekz. "lingno," "kravato," "karoto," "razilo," ktp. estis hazarde disdonataj inter la membroj kaj ili estis invitataj diri du-tri vortojn pri la koncernita objekto. Iuj parolis tiel flue kaj longe ke aliaj pensis, ke ili ne havos okazon paroli. Ĉi tiu estis la pli sukcesa paroligilo, kiun spertis la membroj.

En la Melburna antaŭurbo, Elsternwick, f-ino Agnes B. Lidgley nun instruas kurson ĉe Kongregacia Preĝejo, Orrong Road. Ŝi raportas, ke siaj lernantoj faras bonan progreson, estas entuziasmaj kaj volas eksterlandajn korespondantojn.

Bone konata Melburna Esperantistino, s-ino R. B. Bigelow, tradukis "Tales of Australian Exploration," (Historietoj de Aŭstralia Esplorado) de C. R. Long, M.A., de la Victoria Edukada departemento. La manuskripto estis forsendita al la Esp. Literatura Asocio antaŭ kelke da monatoj.

NOV-ZELANDO — "The Poverty Bay Herald" diras, ke la entreprenemo de lokaj Esperantistoj dissendante per radio lecioniojn en la lingvo ricevas la laŭdojn de multe de radianoj kaj Esperantistoj, kiuj volas pluajn lecionojn kaj paroladojn. La regiona prezidanto de la movado gratulis s-ron kaj s-inon J. L. King pro iliaj sukcesplenaj penadoj. En la letero li espremis la esperon, ke Kongreso

de Nov-Zelandaj Esperantistoj okazos dum la daŭro de la ekspozicio en Dunedin.

La "Association of Auckland Primary Schools Committees" (asocio de komitatoj de la komencaj lernejoj de Auckland) rekomendis al la Registaro, ke Esperanto estu devige instruata. La rekomendo estis malakceptata. Ĉiam unu Registaro atendas la iniciaton de alia!

GRAVA AVIZO AL MEMBROJ DE U.E.A.

La jara kunveno de la Melburnaj membroj de Universala Esperanto-Asocio, okazos en la kunveno de la Melburna Esperanto-Asocio, 350 strato Little Collins, vendredon, je 8.15 ptm la 20an de novembro. La ĉefdelegito raportos pri sia agado dum la pasinta jaro kaj estos preta ricevi abonojn por la venonta jaro. Ekstermelburnaj anoj kaj aliaj kiuj ne povas ĉeesti la kunvenon estas petataj tuj sendi siajn abonojn al la delegito en ilia regiono aŭ rekte al s-ro C. W. Ballard, Ĉef-delegito.

LA FIANĈINO DE LA MINLABORISTO.

De J. P. Hebel.

La jena okazis en Falun 1740. Diligenta minlaboristo vizitis sian fianĉinon. Adiaŭante li diris, "Je ĉi tiu tago en la proksima semajno ni festos nian edziĝon, kaj poste ni metos la piedojn sub la propran tablon." "Jes, kaj ni vivos en nia hejmeto pace kaj ame," la fidema knabino diris, kore adiaŭante sian amikon. La juna viro ree ekiris al sia laboro.

Tamen "homo proponas, sed Dio disponas." Ne okazis tiel, kiel tiuj du junuloj esperis. La pastro anoncis laŭ moro pri ilia edziĝo, sed kiam li dufoje anoncis, la morto venis. Je tiu lunda mateno, kiu venis post la dua edziĝa anonco, la juna viro kiel ordinare ekiris al la minejo. Kiam li preterpasis tiun domon, en kiu loĝis la fianĉino, li frapis la fenestron, kaj diris amike kiel kutime: "Bonan matenon!": sed li ne revenis por diri: "Bonan nokton!" Tiun tagon terdifalego okazis en la minejo, kie laboris la juna viro, kaj li estis entombigita. Lia malviva korpo estis netrovebla.

Lia fianĉino metis tiun koltukon, kiun ŝi kudris kiel fianĉdonaco en keston, sed ŝi neniam forgesis tiun, kiun ŝi amis.

Post tiu ĉi tempo multaj grandaĵoj okazis en la mondo. Oni militis tere kaj mare, kaj denove paciĝis. Reĝoj estis kronitaj kaj mortis. Viroj superis, ili akiris al si gloron, sed pro aliaj estis baldaŭ forgesitaj. Grandaj ŝanĝoj skuis fundamente la ŝtatojn. Regnoj malaperis, aliaj fondiĝis. Dum ĉi ĉio la pli multaj forgesis lin, kiu gvidas ĉion per sia mano; ili pensis tiom pri mondaĵoj, ke ili ne havis penson restantan por la eterneco.

Ankaŭ en Svedujo, dum la tempo de 1740 ĝis la komenco de la sekvanta jarcento, multo estis aliformigita. Kelkaj reĝoj regis; la registaro kelkfoje ŝanĝiĝis; kaj la pli granda parto de malnovaj moroj malaperis kun la malnova generacio.

Okazis en jaro 1809, ke la mineja estraro decidis fari trairon inter du ŝaktoj. Dum la laboristoj estis okupataj je tio, ili trovis kadavron de juna viro. Li estis preskaŭ neŝanĝita. Ŝajne li mortis antaŭ horon. Oni elprenis la kadavron el la minejo. Pro la famo pri tio, multaj personoj iris el Falun kaj el la ĉirkaŭaĵoj de tiu urbo al la minejo; sed neniu sciis kiu povas esti la mortinto. Liaj gepatroj, gefratoj kaj amikoj ĉiuj forpasis.

Tiam tre maljuna virino, blankhara kaj kun sulkita frunto venis, apogante sin sur sia lambastono. Kiam ŝi ekvidis la mortinton, ŝi tiel konfuziĝis ke, lasante fali sian lambastonon, ŝi falis teren sur la mortintan viron. Nur post iom da tempo ŝi trankviliĝis. La maljunulino estis la fianĉino de la mortinto. Si estis la sola persono, kiu ankoraŭ memoris lin. Ŝi rakontis kiel ĉio okazis. La ĉeestantoj estis treege kortuŝiĝintaj. Ili vidis en la maljuna virino la ateston, ke dum la diversaj ŝanĝoj de la mondo, nenio estas tiel konstanta kiel la fidema amo.

La fidema maljunulino estis la sola, kiu havis ian rajton pri la mortinto. Tiun oni portis al ŝia hejmo, kaj ŝi ŝargis sin pri la tuta zorgo de lia entombigo. Kiam la tombo estis preta, kaj la minlaboristoj venis por tien lin porti, ili trovis lin ornamita, kaj kun tiu koltuko, kiun lia fianĉino konservis kiel memoron de feliĉaj junecotagoj, ĉirkaŭ lia kolo. Si mem,

solenvestita tiel, kiel por edziĝo, akompanis lin al la tombo. En ŝia koro ŝi sentis, ke tiu ĉi vivo estas nur la tempo de pretigado por la eterneco, kaj ŝi venkis la timon al la morto per fido al li, kiu estas la releviĝo kaj la vivo.

LETERO AL AMIKO EN EŬROPO.

Kara amiko,

Eble vi iam aŭdis pri la gigantaj arboj de Kalifornio, sed ĉu vi scias, ke la kronikoj pruvus, ke iuj el la plej grandaj arboj iam vidataj estis trovitaj en la arbaroj de Aŭstralio? En nia lando estis eŭkaliptaj arboj, kies alteco atingis 386 futojn. Kiam la arbaristo faligis tian arbon li havis sufiĉe da ligno por konstrui domon el dek ĉambroj kaj ankaŭ fari la tutan meblaron necesan por ĝia interno. El semo eĉ pli malgranda ol la proverba sinapo semo povas kreski arbo pli ol 150 futojn alta. El la folioj de la eŭkalipto oni povas ekstrakti tre valoran medicinan oleon, kiel ankaŭ tre delikatan parfumon. Abunda akvo estas tre necesa en Aŭstralio kaj oni nun konstatas, ke tio povas esti certigata per la konservo de niaj arbaroj. Kiel provizon por siaj necesoj ĉiu lando devus posedi naturajn arbarojn ampleksantajn dudek procenton el ĝia tuta areo. Nur ses procento el la areo de Aŭstralio estas kovrata de arbaroj nuntempe, sed, ĉar la popolo jam nun studas la aferon, sendube la procento altiĝos post nelonge.

Nia estinta Federala Guberniestro, Lord Forster, lastan monaton aŭdiadis nin post kvinjara deĵorado inter ni. En unu el siaj lastaj paroladoj li citis statistikojn, kiujn eĉ ne ĉiu Aŭstraliano scias. Pro tio ke ili estas interesaj mi aldonas ilin, ĝene.

Proksimume sesdek procento el la domoj en Aŭstralio estas okupataj de la posedantoj.

La sumo de 174,000,000 funtoj estis deponita en la ŝpar-bankoj de 4,000,000 personoj.

Ne malpli ol 3,000,000 personoj havas ŝparmonon en la banko.

Preskaŭ 2,000,000 personoj posedas asekuraĵon.

En Aŭstralio troviĝas pli ol 27,000 mejloj da fervojoj, 400,000 mejloj da vojoj kaj 240,000 aŭtomobiloj registritaj.

Estas 16,500,000 akreoj kulturigitaj, kiuj valoras pli ol 81,000,000 funtojn.

La aŭstralianoj posedas 13,500,000 bovojn kaj 80,000,000 ŝafojn. Aŭstralio posedas duoble pli multe da ŝafoj ol iu alia lando, la unuigitaj ŝtatoj de Ameriko havas duan lokon, sed posedas nur duonon de tiu nombro. La valoro de la rikoltoj kaj lano dum la jaro 1923-24. estis 104,000,000 funtoj la farmobienaj produktaĵoj, 42,000,000 funtoj kaj la minaĵoj 22,000,000 funtoj.

Lastan jaron funkciis en Aŭstralio 20,000 fabrikoj kiuj donis laboron al 430,000 dungitoj kiuj ricevis 77,000,000 funtojn kiel laborpagon.

Kun bondeziroj, mi restas,

Sincere via, Karlo Madrigalo.

LA KROKODILBIRDO.

Estas ia pluvio, kiu vivas en interesa kuneco kun la krokodilo. Ĉi tiu birdo havas sian hejmon sur la sablajoj de la Nilo, kaj ĝi ofte ripozas sur la dorso de krokodilo de kie ĝi forpikas la hirudojn. Je ĝia ofico de hirudkaptisto ĝi ofte trovas sian vojon en la buŝon de la rampaĵo, kiu estas ĝenerale malferma, kiam ĉi tiu ripozas en la sunbrilo sur sablaĵo. Okazas iam, ke la krokodilo ekdormas kaj la buŝego fermiĝas, tiel malliberigante la birdon. La birdo tuj pikas per siaj kornaj spronoj la krokodilon por refreŝigi ĝian memoron kaj la rampaĵo tiam malfermas la buŝegon kaj liberigas sian favoran hirudkaptiston. Ĝi funkcias ankaŭ kiel observanto por la malpli zorgemaj kreitaĵoj, per sia stranga bleko de "zik-zak" avertante ilin pri la alproksimiĝo de ĉio kion observas ĝiaj suspektaĵoj okuloj.

—E. Thomas, en Heroldo.

NEKROLOGO.

La 20 julio mortis en Paris post operacio baronino de Menil, edzino de nia altŝatata samideano, komponisto de "La Espero." S-ino de Menil estis fervora esperantistino: antaŭ la milito ŝi estis komitatanino de la Pariza grupo kaj prezidantino de la "Esperantistaj Teoj," post la milito ŝi okupiĝis pri nia movado en la romkatolikaj medioj. Al s-ro de Menil ni prezentas niajn plej sincerajn kondolencojn.—Heroldo.

LA MEVO.

(Fama rusa kanto)

Ruĝiĝas mateno . . . heliĝas aero. —
Al suno rapidas la mevo vekita:
Ĝi krias, ĝi ĝojas pri kara libero . . .
Per kisoj de l' sun' estas ĝi orumita.
Ekpafo! finiĝis feliĉo fantoma . . .
En lago tremetas la mevo, mortante.

Pro distro ĝin vundis ĉasisto sen-noma . . .

Li lasis la birdon, jam ĝin forgesante.

Kaj kiel la mevo, belega knabino
Vivadis kviete ĉe lago trankvila . . .
Ŝi ĉion oferis al amo sunbrila.

Kaj kiel pro ŝerco pereis la mevo.
Jen estas pro ŝerco la koro rompi-ta,

Jen estas rompita por ĉiam la revo
Espero malestas en viv' noktigita . .

—Esperantigis Mikaelo Maliŝev en "Heroldo."

ĈINOJ INSTRUAS ESPERANTON AL INFANOJ.

La Pekina Esperanto-Kolegio fondis en Aprilo la popolinfinan elementan lernejon por malriĉaj infanoj. Instruado estas senpaga, instruistoj estas studentoj de P. E. K., kiuj senpage liveras lernolibrojn al infanoj. Bonvoluloj monoferas. La direktoro estas studento Dancreal Van. Esperanto estas en la programo de la 2-a kaj 3-a klasoj. La lernejo havas tri klasojn po 45 gelernantoj. Oni ankaŭ klarigas al la infanoj la Esperantismon, oni instruas pri paco kaj frateco. Krom Esperanto oni instruas kantadon, desegnadon, aritmetikon nacian lingvon kaj gimnastikon. Kiu interas pri la laboro de P. E. K., tiu skribu al s-ro D. Van, direktoro de la elementa lernejo, Peking, Pekina Esperanto-Kolegio, Hinujo.
—Inocento Serisev, en "Esperanta Junularo."

* "Radio Revista," Buenos Aires, is publishing lessons in Esperanto and often contains interesting articles about it. S-ro Repto, who attended the Radio Congress in Paris, is an ardent Esperantist.

ĈIU ESPERANTA POŝTAJO KIEL PROPAGANDILO.

S-ro Charles G. Stuart-Menteth, 31 Upper Bedford place, London, skribas—"Mi volus proponi, ke ĉiu Esperanta poŝtaĵo estu distingebla per la jenaj rimedoj; se por alilando skribu geografiajn nomojn kaj numeralojn en grandaj literoj. Adresoj kie la stampado ne difektos ilin. Nur unu poŝtmarko en la ĝusta loko. Papero kiel eble plej malpeza kaj malampleksa, kompreneble kun sufiĉa afranko. Poŝtsendu frue en la mateno, aŭ je malpejle okupata tempo de poŝtoficistoj, por ke ili havu ŝanĉon rimarki la Esperantistajon."

VERA OKAZINTAJO.

Dum la inflacia tempo en Germanlando eksterlandano intencis eluzi la valuton por li favoran kaj aĉetis en bavara urbo proksime de la limo belan vestaĵon por kelkaj malmultvaloraĵoj moneroj. Kun la pakajo sub la brako li kontente alrapidis la stacidomon kaj eniras kupeon. Kiam apenaŭ la trajno estas ekveturanta, li retiriĝas en la necesejon por sin alivestigi kaj per tio ruze trompi la doganistaron. Sian mizeran, malnovan vestaĵon li elĵetas tra la fenestro kaj la novan li estas surmetonta. Sed, ho ve! Kiam li malfermas la pakajojn, jen mankas la pantalonon.

RELIGIO EN JAPANUJO.

La partoprenantoj en la fakkunsido de religistoj, okaze de la XIIa Japana Esp. Kongreso akceptas en la nomo de Oomoto'a Esperanto-propaganda Asocio kaj Japana Kristana Esperanto-Federacio jenajn rezoluciojn kaj rekomendas: 1e, Ke Ĉiu religia grupo en Japanujo lernu kaj disvastigu Esperanton; 2e ke, la instruistoj de dimanĉaj lernejoj propagandu Esperanton inter siaj kaj aliaj lernantoj; 3e la religiaj gazetoj kaj ĵurnaloj uzu esperantigitajn religiajn proprajn nomojn; 4e la ekzistantaj kaj fondotaj grupoj religiaj kunlaboru por la komuna celo de esperantismo kaj klopodu fondi eventuale Tutjapanan Federacion de religistoj Esperantistoj. [Revuo Orienta.]

OUR SUPPORTERS.

S-ro G. Snowdon, Seymour—"... wishing the little paper further success. I congratulate Mr. Rawson and the fraŭlineto on the 3LO talk. Hope talks will be continued."

Mrs. F. Livy, Blackwood—"I wish Suda Kruco every success."

S-ro J. Mader, Hikurangi, N.Z. — "Kun espero mi rigardas antaŭen ĝis la tempo kiam nia ĵurnaleto iom kreskos. Estas certe multaj spertaj Esperantistoj kiuj kapablas kunlabori por fari tion. Dume mi deziras al vi kaj nunaj laborantoj plej bonan sukceson."

Mr. E. M. Wallace, Cunderlin, W.A. — "As an isolated and self taught Esperantist I am thankful that the 'Suda Kruco' has not been discontinued. I send my subscription herewith and wish the paper continued success."

Mr. F. Paulsen, Kingaroy, Queensland.—"I wish the Esperanto movement and its paper every success. I enclose my subscription."

Readers will regret to learn that Miss E. Alleyne Sinnotte, F.B.E.A., authoress of "Lilio," one of the most proficient Australian Esperantists. has latterly been in very indifferent health and her sight is now so bad that she has to greatly restrict her reading. We extend our sympathy and hope that she may speedily be restored to health.

RECEIPTS (SUBSCRIPTIONS).

Up till 3rd November the following sums were received, (the figures in brackets indicate the month and year to which payment is made):—W. T. Middleborough, 4/6 (6/26); F. T. McArdle, 5/- (9/25); C. Caine, 4/6, (6/26); H. M. Leighton, 4/6 (6/26); M. Helm, 4/6 (6/26); J. Mader, 5/- (7/26); E. A. Sinnotte, 2/3 (12/25); —. Padgham, 4/6 (9/26); F. Halliday, 9/- (7/27); J. A. Hodges, 4/6 (6/26); A. Moyle, 4/6 (6/26); A. H. Slade, 10/- (7/27); G. Snowdon, 4/6 (4/26); F. Livy, 4/6 (12/25); F. Barr, 4/6 (10/26); F. Paulsen, 5/- (8/26); E. M. Wallace, 5/- (7/26).

ALIA LIBRO DE NITTI.

La Frankfurter Societats-Druckerei, skribas:—La Esperanto-eldono de la libro de Francesco Nitti "Eŭropo ĉe la abismo" farita de ni, bone plaĉis en Esperantistaj kluboj, sed la vendigo en tiuj-ĉi rondoj ne respondis al niaj esperoj. Malgraŭ tio, ni intencas laŭ speciala deziro de ekscelenco Nitti prepari ankaŭ Esperanto-tradukon de ties nova libro "La Paco." Tiu-ĉi eldono kaŭzos al nia eldonejo grandan riskon kaj grandajn elspezojn. Per la eldono de Esperanto-libroj de Nitti la eldonejo estas servanta al la Esperanto-movado kaj estas preta ankaŭ plue fari tion kaj ekeldoni la novan libron, se flanke de la Esperanto-organizaĵoj venos la neceza subteno por la vendado de la libro. Pri la valoro kaj la graveco de tiu-ĉi nova verko de Francesco Nitti ni ne bezonas diri al vi pluan, ĉar pri tio jam detale raportis la gazetaro de la tuta mondo. Francesco Nitti mem opinias, ke tiu-ĉi libro estas sia plej bona kaj grava."

GAZETOJ RICEVITAJ.

Administraciaĵoj bonvole sendu siajn ĵurnalojn laŭ ĉi tiu adreso — "La Suda Kruco," Box 731 F, P.O. Elizabeth-st., Melbourne, Australia":—Amikeco, 9; Amerika Esperantisto, 3; Bulteno Antverpena 8, 9; Heroldo de Esperanto, 66 ĝis 72; Hinda Esperantisto, (Administracio, Kranggan 19/23, Semarang, Java), Unua jaro, n-ro 1; International Language, 8; Itala Esperanta Revuo, 5 ĝis 9; La Unuigita Tuthomaro, 9, 10; La Kolportisto, 4, 5; La Suno Hispana, 99-100; La Nova Tago, 2; Litova Stelo, 8/9; La Progreso, 8, 9; Oomoto, 8, 9.

S-ro Carl Preu, Fleischergasse 7, Annaberg Erzgeb, Germanujo, volas korespondi kaj interŝangi gazetojn, il. pk., l., p.m. Ĉiam respondos.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro C. W. Ballard; sekretario: f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunveno: Hardware Club Chambers, 350 Little Colline-str., vendrede vespere, je la oka horo.

Hobarta Esperanta Grupo. Kunveno: Eaton-Bray-lernejo, Davey-str., ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidantino F-ino C. M. Hannaford. Sekretario kaj poŝta adreso F-ino A. Beckett, 177 Davey-str., Hobart.

"Iru Antauen"-Grupo. Prezidantino: S-ino E. S. Bigelow. Sekretario, S-ro J. Parker. Poŝta adreso, Warrigal Rd., Oakleigh. Kunveno: 36 Kangaroo Rd., Oakleigh, marde vespere, je la oka horo.

"Nigra Cigno"-Grupo. Prezidanto S-ro E. J. Goody, Sekretariino F-ino F. Cherrett. Poŝta adreso, 46 Leonard str., Victoria Park, W.A. Lernantoj kunvenas ĉe Perth Academy, 8 horo, merkrede; progresintoj, 277 Hay-str: 8 horo lunde.

Persista Grupo, Armadale, Melbourne. Prezidanto: S-ro H. Byatt, Sekretariino: F-ino I. Thomas, Kunveno kaj poŝta adreso, 37 Brunel St., East Malvern, merkrede vespere, je la oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 7.45—10 p.m. ĉe "Rawson Chambers," Rawson Place (5a etaĝo, ĉambroj 580-583). Ĝuste apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: S-ro F. V. Taylor; Sekretario: S-ro L. E. Pfahl, 150 George's River Road, Croydon Park, Sydney.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send for —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.